

Mortis Kálmán Kalocsay : La mezepoka Esperanto, el Lingvo, Stilo, Formo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 655, 1976.04.28 & 05.01

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Mortis pioniro de nia literaturo. Vi certe jam scias, ke la 27-an de februaro forpasis en Budapeŝto nia granda Kolomano Kalocsay.

A.- Ne estas nia intenco en kelkminuta elsendo detale nekrologi pri la aŭtoro de tiom da verkoj originalaj kaj tradukitaj kaj pri la ĉefredaktoro de **Literatura Mondo**. En la esperanto-organoj vi havos la okazon multon legi pri la vivo kaj influo de nia granda poeto kaj gramatikisto. Hodiaŭ ni volas atentigi vin pri la ofta neatenditeco de la tekstoj, kiuj sin kaŝas malantaŭ seriozaj titoloj en ne malpli seriozaj titoloj verkoj de Kolomano Kalocsay.

Cl.- Ni malfermu la verkon **Lingvo Stilo Formo** je la ĉapitro **La mezepoka Esperanto**. Jen kion ni trovas :

A.- Vere, estas granda negletemo de mia flanko, ke mi ankoraŭ ne prezentis al vi mian amikon C. E. R. Bumy [cerbumi]. Ĉar li estas tre originala homo, kun siaj eternaj problemoj, eterna senkombeco, eternaj tri libroj sub la brako. Kio estas lia profesio ? Mistero. Eĉ tion mi ne kuraĝas aserti decide, ke li manĝas, kiel la ordinaj homoj. Eble el antikvaj kaj mezepokaj poemoj li elsuĉas por si ian ambrozion. Eble pro tia etera nutraĵo li estas tiel diafane malgrasa.

Cl.- Li estas esperantisto. Mi varbis lin jam antaŭ longe. Tuj li ekinteresiĝis kaj eksprese li ellernis la lingvon, laŭ sia maniero : li lernis la gramatikon, poste la vortaron, poste li ellegis mian bibliotekon. Post ok semajnoj li jam liveris al mi – tute pretan reformprojekton. Mi priridis lin, klarigis, ke Esperanto estas vivanta lingvo, havas popolon, oni ne plu povas ĝin tondi kaj glui laŭplaĉe. Mi demandis, ĉu li kuraĝus reformi vivantan nacian lingvon, ekzemple la hungaran ?

A.- Kial ne ? – li respondis.

Cl.- Kaj ĉu vi sukcesus akceptigi vian reformon ?

A.- Eh ! Ĉu tio gravas ? – li mansvingis, tute malŝate pri mia « naŭza realismo ».

Cl.- Tamen, ĝis nun li ne liveris al mi la grandan reformon de la hungara lingvo, kaj enterigis ankaŭ sian Esperantan reformon. Li komencis labori literature. Kompreneble dum tio li inventis kelkajn aferojn. Mi menciis nur la prepozicion **graŭ**, kiel « senmaligon » de **malgraŭ**, kaj la adjektivon **ica**, kiel « senmaligon » de **malica**. Liaj lingvaj konsiloj ĉiam estis frapantaj, vere kapfrapantaj. Foje oni diskutis pri la tro longaj vortoj ; estinteco, estanteco, estonteco. Iu insistis pri la formoj : pasumo, nuntempo, futuro, alia riskis : itempo, atempo, otempo.

A.- Azenoj vi estas ! – interkriis nia C.E.R. Bumy. Jen la sole ĝusta solvo : **timpo, tampo, tompo** !

Cl.- Jes, tia li estas. Ĉiam li havas geniajn ideojn, kaj ĉiam li malprosperas kun ili. Sed tio ne intereresas lin. Li ja ne estas « abomena realisto ».

A.- Lastatempe li ŝajne elreviĝis pri Esperanto, ne sufiĉe taŭga por naski problemojn. Mi longe ne vidis lin en la grupo. Hazarde ni renkontiĝis sur la strato.

Cl.- Nu ? – mi demandis riproĉe.- Kial vi perdiĝis ?

A.- Mi estas tro okupita.

Cl.- Problemo ?

A.- Jes. Sed nun ne literatura. Mi laboras pri teknika problemo.

Cl.- Teknika problemo ?

A.- Jes. Sed tio ne interesas vin, vi, versvermo !

Cl.- Eĉ, tre interesas min, vi, realisto ! Rakontu do!

A.- Nu, mi provos al vi komprenigi la aferon. En la tuta mondo, vi scias, estas granda ekonomia krizo. Kial ? Ĉar oni ne povas tiom konsumi, kiom oni produktas. Kial ? Ĉar oni produktas per maŝinoj kaj konsumas per homfortoj. Jen la granda malegaleco ! Kompreneble homo ne povas konkuri kun maŝino, sekvas troprodukto, laborĉesigo, senlaboreco. Ĉiu homo scias tion, kaj, ho, la azenoj, tamen ne trovis la solvon. Mi devis alveni rekte el la paĝoj de mezepoka fablolibro por solvi la problemon. Kvankam ĝi estas ja ovo de Kolumbo. Maŝinon oni devas meti kontraŭ maŝino. Mi jam projektis preskaŭ complete.

Cl.- Kion ?

A.- Homo ! eĉ nun vi ne divenas? La **konsum-maŝinon** !

Cl.- Ko... ko...kons...

A.- Kial vi balbutaĉas? Jes, la konsum-maŝinon. Oni simple ekirigos mian maŝinon kaj ĝi konsumos. Ho, kiel ĝi konsumos ! Per centoj kaj miloj da ĉevalpovoj ĝi konsumos! La magazenoj malpleniĝos fabelrapide! Oni ree devos produkti, la fabrikoj ree eklaboros, la senlaboreco ĉesos. Mia maŝino forblovos la krizon ! La mondo estas savita !

Cl.- En **Lingvo Stilo Formo** de nia ĵus mortinta **Kolomano Kalocsay** vi povos legi la finon de tiu ĉi rakonto kaj vidi kiel ĝi rilatas fine al **La mezepoka Esperanto**. Vi samtempe eble profitos legi la tutan libron, kio estas ĉiam aktuala, ege instrua kaj facile asimilebla. Ni honoru niajn aŭtorojn ne nur per belaj dankaj paroloj, sed ankaŭ per la studado de iliaj verkoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!